nia voĉo

madrida esperanto-liceo majo 2014

## KONFERENCO PRI INSTRUADO DE ESPERANTO, DUM HISPANA KONGRESO

Kiel ni jam plurfoje anoncis, ĝuste dum tiuj ĉi tagoj, inter la 1-a kaj 4-a de majo, disvolviĝos en Arundo (Ronda) la 73-a Hispana kaj 18-a Andaluza Kongreso de Esperanto.

Jam publikiĝis la definitiva programo, plena je kulturaj, distraj, turismaj kaj organizaj aktivaĵoj. Oni povas ĝin ekzameni en la retpaĝo de la kongreso en la adreso: http://arundakongreso2014.wordpress.com/.

La aktivado kiu donas la motton al la programo estas "Flamenko kaj Esperanto", kaj la kongresanoj povos ĝui la arton de pluraj profesiaj kantistoj, kiuj montros la esencon de tiu unika ĝenro, kiu havas en Arundo unu ĉefan centron.

Krome, gravan rolon ĝuos la agadoj rilataj al instruado de la internacia lingvo. Estis do anoncita la "1-a Konferenco pri la instruado de Esperanto, en Hispanio kaj la mondo", dum kiu oni pritraktos diversajn flankojn de la instruado de Esperanto. Okazos prelegoj, interŝanĝoj de spertoj, iniciatoj por kunordigi agadojn. Oni montros ankaŭ praktikajn ekzemplojn, pere de la instruado al komencantoj el la urbo kaj ĉirkaŭaĵoj kaj al partoprenantoj de la Kongreso.

Eblos trapasi oficialan ekzamenon de Esperanto akorde kun la nova internacia ekzamensistemo, kiu konformas al la postuloj de la Konsilio de Eŭropo, kaj difinas lingvokonajn normojn. Por ekzameni la kandidatojn venos al Arundo la ĉefa respondeculo de edukado.net, Katalin Kovats, kiu estos honora gasto de la Konferenco.

Por koni pli pri la Kongreso kaj koneksaj aktivadoj, kaj por aliĝi al ĝi, vizitu la cititan paĝon http://arundakongreso2014.wordpress.com/.

## PARTOPRENO EN LA TAGO DE LA LIBRO

Kiel anoncite, MEL partoprenis la tradician ĉenlegadon de "Donkiĥoto" en la kulturcentro Círculo de Bellas Artes de Madrido. Alex kaj Andy legis po unu fragmenton de la dua Libro, ĵaŭdon la 24-an de aprilo, vespere.

La legado estis registrita, kaj ĝi spekteblas en la adreso de Jutubo de la Liceo: http://www.youtube.com/watch?v=0KHHcyP-tyI.

La 23-an de aprilo Alejandro Pareja partoprenis la celebradon en Valdemoro, per la legado de peco de Donkiĥoto en la kultura centro Juan Prado.



La dimanĉon 27an de aprilo oni celebris la Tagon de la Libro en la Junulargastejo de San Fermín. La organizantoj invitis al MEL por partopreni en la agado, per la prezentado de la libro "Poezio: armilo ŝargita per futuro" de Miguel Fernández. Miguel prezentis la lingvon internacian kaj la libron, kaj li deklamis kelkajn poemojn, akompanate de Mati Montero, en la hispana kaj en Esperanto.

Ankaŭ tiu ĉi agado estis registrita kaj publikigita en la MEL-kanalo: http://www.youtube.com/watch?v=cdHSBcB5Eac.

# nia voĉo majo 2014

## EKSTERORDINARA KUNVENO DE MEL

En la sidejo de Madrida Esperanto-Liceo, la 28-an de aprilo 2014, je 19:00 horo, post kunvoko de la Prezidanto, estis celebrita Eksterordinara Ĝenerala Kunveno de la asocio. La celo estis modifi la Statuton, pro leĝa postulo de la regiona Administrado respondeca pri asocioj. La adapto estis akceptita unuanime.




## EKSPOZICIO EN SEGOVIO

La ekspozicio de la sindikato CGT, kiu dum lastaj monatoj vojaĝis al diversaj urboj venis al Segovio kaj estos vizitebla inter 1-a de aprilo kaj la 4-a de majo, sub la nomo "La lingvo kiel liberigo: Esperanto", en la Centro Cultural San José.

Oni komplementis ĝin per prelego la 24-an de aprilo, fare de Enrique Santos Marinas, profesoro pri slaviko de la Universitato Complutense de Madrido.

Pri la ekspozicio kaj prelego aperis ampleksa artikolo en la loka ĵurnalo "El Adelantado de Segovia", kun informoj pri la lingvo. Eblas ĝin legi en la adreso: http://www.eladelantado.com/noticia/ultima/190068/el_lenguaje_como_una_liberacion

## VIZITOS NIN

Dum monatoj junio kaj julio vizitos Hispanion por sekvi la Pilgriman Vojon de Sankta Jakobo, samideanino el Japanio, Taeko Osioka. Ŝi alvenos Madridon la 3-an de junio, kaj tuj poste vojaĝos al Navaro. Ŝi revenos al Madrido ĉirkaŭ la 21-a de julio kaj restos kelkajn tagojn dum kiuj ŝi rendevuos kun madridaj esperantistoj.

Loĝantoj de urboj ĉe la vojo povas kontakti nin por koni la detalojn, ĉar ŝi volonte kunvenos kun esperantistoj. Ekzemple, ŝi planas troviĝi en Pamplono la 8-an de junio, en Burgoso la 18-an, en Leono la 27-an, en Santiago la 18-an de julio. Taeko estas veterana esperantisto, aktivulo de la pacista movado.

## KURSOJ EN LA SIDEJO

La kursoj kiujn gvidas Juan del Castillo disvolviĝas denove en la sidejo de MEL (strato Rodríguez San Pedro, 13), sabate matene.

## VENONTAJ KUNVENOJ

La kutimaj kunvenoj de MEL, plu okazas ĉiulunde post la 18,30. Sceptokaze, la lundon 5an de majo ne okazos MEL-kunveno.

Ĉimonate, pro la okazigo de la Hispana Kongreso, ne estos kunveno de la unua sabato. Atentu postajn informojn pri aliaj rendevuoj.

Por esti informitaj pri ĉiuj novaĵoj kaj detaloj pri renkontoj kaj aliaj vizitu regule la retliston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/ kaj la retejon de MEL ĉe la adreso http://www.esperanto.es/mel. Memoru ke estis kreita grupo en la socia retejo Fejsbuko (Facebook), por esperantistoj loĝantaj en Madrido kaj ĉirkaŭaĵoj: https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com